

LA VERDA LUPEO




Informilo de ELF/AREK

Aprilo 2015

(47a jaro)

N-ro 168

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ



La individua E-pm
(49 cent)

LA KVARO POR LA KVARA
(UK en Dresden 1908)
de „post MODERN“,
Aperinta en Decembro 2009

kun Marie Hankel,
d-ro H. Arnhold,
d-ro E. Mybs,
d-ro A. Schramm.



Nachbestellung: www.wunschbriefmarke.de

Hotline: 0800 - 99 66 33 1 • www.post-modern.de

Werbung aber zackig, die PostModern-Wunschbriefmarke.

Tre estimataj kaj karaj ELF-AREK-anoj

Jam kvaronjaro pasis ekde la komenco de la 2015-a jaro kaj estas la momento pensi pri pago de Elf-Arek-membriĝo. Sen via konstanta, ĉiujara, fidela helpo nia Ligo ne povus vivteni sin, oni ne plu povus multobligi kaj forsendi "LA VERDA LUPEO"-n...

Mi rememoras la kostojn: 15,00 eŭroj por membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj; 17,00 eŭroj por ĉiuj aliaj.

La kotizo estas pagebla aŭ al UEA-konto: elfx-r aŭ al mia Poŝta Bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 -

BIC: BPPIITRRXXX



Pluraj Liganoj jam pagis sian kotizon, eĉ fine de la pasinta jaro, kaj al tiuj mi adresas mian plej elkoran dankon. Inter tiuj troviĝas ankaŭ persono el Pollando, kiu malavare kaj konstante ĉiun duan aŭ trian monaton sendas al mi dekojn da internaciaj respond-kuponoj. Tiujn mi utiligas por forsendo de *La Verda Lupeo*: li estu kore dankata pro sia farado.

Danke al la laboro de s-ro Giacomino Martinez, kiu enkomputiligis la enhavojn de ĉiuj katalogoj (pri stampoj, glumarkoj, poŝtmarkoj k.a.), siatempe faritaj de nia karmemora Richard Hirsch, samtempe ilin korektante kaj aktualigante, en sufiĉe proksima tempo estos preta la poŝtmarka katalogo, en kiu enestas kaj la oficialaj kaj la individuaj poŝtmarkoj. Ĝi ne estos disponebla en papera versio, ĉar la kostoj estas tro altaj kaj pro la multobligado kaj pro la poŝta sendo: la pm-a katalogo havos entute ĉirkaŭ 160 A4-formatajn paĝojn. Oni simple kopios ĝin en diskon kaj ĝi estos sendita al ĉiuj interesitoj kontraŭpage de nuraj kostoj de la disko, koverto kaj sendo. Al s-ro G. Martinez koran dankon de ni ĉiuj. Mi profitas de ĉi tiu okazo por alvoki vian kunlaboron: rilate al individuaj poŝtmarkoj, ekzemple, ofte mankas preskaŭ ĉiuj informoj, pri eldondatoj, pri grafikistoj, pri kvanto da eldonitaj pm k. a. Mi esperas, ke ĉiuj vi estos pretaj kunhelpi.

Liston de la pm-oj pri kiuj estas bezonataj kromaj informoj mi aldonos sur aparta folio, tiel ke vi mem povos kontribui.

Tre baldaŭ ni komencos kontroli la glumarkan katalogon: ankaŭ kontrolado kaj korektado postulas multe da tempo, oni eĉ ne povas imagi kiom!

Kiel sciante, ĉijare okazos en Lille, Francio, la 100a UK de Esperanto kaj tiam estus bone ke ankaŭ nia asocio estu reprezentita, ekzemple dum la Movada Foiro.

Ankoraŭ mi ne certas pri mia ĉeesto, sed jam nun komencu pensi pri Via kunlaboro, kaze ke Vi en ĝi partoprenu. Estos je nia dispoŝto senpage tablo sur kiun dismeti nian propagandan materialon kaj la laboro konsistas el nur kelkhora deĵorado tie, ekde la 19a horo: jen bona okazo por diskonigi nian asocion,

La materialon - kaze de mia neveno - mi sendos al tiu(j) kiu(j) sin anoncos rete telefone/perpoŝte/telegrame/fakse al mi. Ĉijare, apud nia tablo, probable estos la nova asocio ENA - Esperanto Numismatika Asocio, kun kiu iuj el vi jam rilatas. Estus bona okazo por interŝanĝi spertojn.

Mi tre dankas Vin pro la atento, havu bonegan daŭrigon en la 2015a jaro!

Via prezidanto Elda Doerfler


Ĉu eble iu scias, kio estas, aŭ pli bone estis, “Floraj Ludoj”? Ne, ne temas pri ludado perflora, sed pri ege grava beletra konkurso iniciatinta en 1908, do antaŭ pli ol 100 jaroj, de la kataluna esperantisto Frederic Pujula Valles, kies vivo-historio estas ege interesa kaj eventoriĉa.

La Floraj Ludoj fontas el mezepoka okcitana tradicio en 1323. Ekde 1393 ĝis la fino de la 15a jc tiu beletra festo estis importita en Katalunion, en Barcelonon. Nur dum la 19a jc ĝin oni restarigis kiel simbolon de retroviĝo kun la klasikeco de la kataluna lingvo.

En 1909, lige kun la 5a Barcelona UK, la kataluna esperantistaro internaciigis tiun tradicion. Poste estis paŭzo pro la 1a

mondmilito, alia paŭzo okazis inter 1928 kaj 1933. Sed denove tiu evento estis haltigita dum la civila milito (1936). Post disfalo de la *Franco-reĝimo*, la Kataluna E-Asocio relanĉis en 1978 la konkurson, en kiu pli poste kunlaboris LF-koop. Definitive ĝi ĉesis okazi de post 1993 kaj la Floraj Ludoj transformiĝis en simplan festivalon de poezio. Sed ni revenu al la jaro 1909a. Imponis la UK en Barcelono pro sia densa programaro kaj interveno de gravaj aŭtoritatuloj.

Inter alie “Lia Majesto la Reĝo de Hispanujo nomis nian Majstron, Don Zamenhof, Komandoro de Elizabeto la Katolika”. El 42 plej eminentaj esperantistoj tiutempaj konsistis la juĝantaro, kies prezidantoj estis Rektoro Boirac, Sro Grabowski (pri poezia fako) kaj Dro Bein (pri la proza). Ili havis la malfacilan taskon prijuĝi la verkojn partoprenintajn la konkurson. La organiza komitato, konsistanta el Carlo Bourlet (prezidanto), Dro Rene Artigues (sekretario) kaj Barono de Menil (asesoro) akceptis nur la senpartiajn decidojn de la juĝintaro.



Ĉirkaŭ kvardek estis la konkursoj, kies temoj plej variis - ĉu prozaj, ĉu poeziaj kiel ekzemple: *Leviĝanta suno kaj Verda Stelo* (premio de Japana Esperantisto), gajninto Clarence Bicknell el Bordighera; *Monografio pri Hispana Pentristo* (premio de la gereĝoj de Hispanujo), gajninto Gabriel Chavet, el Parizo; *Esperanto, kiel Simbolo de Paco kaj Amo*, (premio de esperantista grupo de Gracia), gajninto Fino L. Boistel, el Levallois-a Perret (Fr); *Regno de Homoj* (premio de dro L. L. Zamenhof), gajninto Paul de Lengyel (hungaro), el Parizo; kaj multaj aliaj.

Reĝino de la konkurso, ricevinta la unuan premion por poezio pri la temo “Amo”, estis aklame deklarita iu germana esperantistino. Jen kiel disvolviĝis tiu grava momento: La proklamado de la konkursaj rezultoj estis okazinta en la vasta gotika halo de la Barcelona Borso, kie posttagmeze la esperantistaro amasiĝis, antaŭ la enveno de la tuta urbestro, la prezidanto de la kataluna deputitaro, D-ro Zamenhof, la Akademio kaj la juĝintaro.

La urbestro oficiale anoncis: “Gesinjoroj, la Festo komenciĝas!”.


Solene D-ro Artigues konigis la nomon de la gajninto: S-ino Marie Hankel. Tondra aplaŭdado substrekiis la emocian momenton.

“La simbolo de l’ amo” estis la titolo de ŝia poeziaĵo. Valoras do, legi tiujn rimaĵojn, danke al kiuj ŝi famiĝis en la mondo kiel la unua Esperanto-poetino.

*Rozujo sovaĝa, simbolo de l' amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.
Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas:
„Silentu, silentu, mi dormon bezonas,
Min nutras denove patrino la tero.
Trankvile atendas mi ĝis la somero.“
Dormantan rozujon printempo vekigis,
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.*

*Ho, donu al mi nun kroneton belfloran,
Girlandan, balancan kaj brile koloran!
„Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian.
Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,
Pro amo mi miajn floretojn defendos,
Pro amo mi miajn pikilojn forsendos.“
Al vento ĝi florfoliojn oferis,
Aŭtune la fruktoj fiere aperis:
Rozujo, simbolo de l' amo vi estas,
Trankvila, alloga, kuraĝa vi estas.*

Certe en tiuj tempoj similaj aranĝoj estis tre alte taksataj kaj samtempe plivalorigitaj. Sed precipa kialo estis, ke tiam Esperanto estis ankoraŭ tre juna kaj tial la apero de originalaj verkaĵoj havis apartajn signifon kaj gravecon ĉefe por la propaganda agado kaj favore al diskonigo de la internacia lingvo.



Kiel antaŭe dirite, la Internaciaj Floraj Ludoj ne plu okazas de post 1993, sed jam en 1948 bonŝance UEA decidis lanĉi literaturan konkurson kadre de la Universalaj Kongresoj, kun celo evoluigi la E-kulturon en kaj pere de Esperanto. Ekde 1953 la aranĝo estis nomita “Belartaj Konkursoj de UEA”. Inter la gajnintoj de la Konkursoj troviĝas, ekde tiam ĝis nun, eminentaj bone konataj esperantistoj kiuj treege kontribuis al pliriĉigo de la esperanta literaturo precipe en la branĉoj Poezio kaj Prozo. Tiu ĉi prestiĝa Konkurso ege gravas por la Esperantista movado, kaj espereblas, ke pro ĝi pli kaj pli da talentuloj proponu verkojn valorajn kaj vere originalajn, por la antaŭeniro de nia kulturo.

Marie HANKEL geb. Dippe
geb. 22.1844 in Schwerin (vor 170 Jahren),
gest. 15.12.1929 in Dresden (-Urnenhain Tolkewitz-)

Hanna Sensakowicz-Kollberg (PL) geb. Snyk, (*1938 Breslau)
Malerin in DD-Vorkern (Finkenauzentrum) - Januar 2017

Marie Hankel.
1844 - 1929

Erste Esperanto-Dichterin: 1900 Barcelona (5a UK)
Präsidentin von „Esperantista Literatura Asocio“ (ELA),
Witwe des Mathematikers Prof. Dr. Hermann HANKEL.

91a Germana Esperanto-Kongreso en Erfurt - Junio 2014 (pentekosto) - www.esperanto.de/gek2014

Esperanto живём! Esperanto labti! Esperanto vivas! Esperanto lives!

25 Jahre
Gründung:
Haus der Professoren der
TU Dresden, Einsteinstr. 9

FKE-Gästebuch, Seite 83 (9. Oktober 2007):
Ich wünsche Ihnen für Ihre vielfältigen
Engagements und Ihr außerordentliches
Engagement zum Erhalt und der Förderung
von Esperanto viel Erfolg und der Förderung
weltweiter Kontakte für alle, die sich
im Schutze der Föderation, Arbeit
internationaler Vernetzung.

Maria Hankel
Apfel Post
Kanzler der Technischen Universität Dresden

Es lebe
Viva Dresden!
Long live
La spravaĵoj Dresden!

Heute erleben: 26.2.14
www.geschichtsmarkt-dresden.de (22./23.03.2014)

„Tag der offenen Tür“ am Samstag, 22.03.2014, 15:30
18:00 Uhr, Esperanto-Zentrum „Marie Hankel“, DD-Blauer
Münchener Platz 3, Treff im Cafe Möbius, Münchener Platz 1

Vorschau 13./14.12.2014 2. Marie-Hankel-Kulturtage

Herzliche Grüße von / Korajn salutojn de
Wolfgang & Barbara
zum 100. Geb'tag von Ino sind wir
wieder in Leipzig!

Spender aus nah und fern (Koran danken!):
Fam. Beau, K. Dietze-Lehmann, D. Huthmann,
N. Karbe, K. Langer, F. Petri (Fam. Susa/Bernhardt),
H. Sroinski u.a.

FD Foto-Arteller Diebel
August-Diebel-Str. 33 (am Wiesplatz)
www.foto-diebel.de

Hörgeräte
Klaus Dippel
www.hoergeraete-dippe.de

City-Cards
www.citycards-dresden.de

- Freundeskreis Esperanto an der TU Dresden im DEB e.V. -
Esperanto-Zentrum „Marie Hankel“ - Sächsisches Esperanto-Archiv
adresse: c/o TU Dresden, Helmholtzstr. 10, 01069 Dresden
loko: Georg-Schumann-Bau/Raum E 5, Münchener Platz 3
Tel: 0351/20 30 815 (Dr. W. M. Schwarz - geschäftsführender Sprecher)
e-posto: ez_mh@web.de
DEB-Spendenkonto: Sozialbank Mainz IBAN: DE 05 5502 0500 0008 6036 00
BIC: BFSWDE 333MNZ (Spende für: EZMH-DD)




City-post - 490
6. FEB. 2014
Brief.
Poŝtkarto
Tag der Sachsen in der
Lesaffage-Kamenz
2. bis 4. September 2014

Fam R. Burmeister
M.-Müller-Str. 86
Chemnitz 09123

esperanto
bona ideo!

„Seid fröhlich in Hoffnung“ - Gestaltung: ak

26.2.2014 aperis la 15a infokarto en Dresden.
Bildflanke kun Hankel-portreto
Informis nia kluba amiko d-ro Wolfgang SCHWARZ.



2. Dresdner Marie-Hankel-Kulturtag 12.2014
Schirmherr Dr. Matthias Röbber – Präsident des Sächsischen Landtages
www.ez-marie-hankel.de

Für Ihre Fragen sowie für Ihre Nachbestellung stehen wir Ihnen gern unter: 0351 - 48 64 66 93 zur Verfügung. Bitte geben Sie bei Ihrer Nachbestellung unbedingt Ihre Motivnummer: 140919-01 an.

Infos und Hilfe gibt's auch unter:
Service-Telefon: 0800 - 99 66 33 1 - www.wunschbriefmarke.de

Freundeskreis Esperanto an der TU Dresden im DEB e.V.
Esperanto-Zentrum „Marie Hankel“ – Sächsisches Esperanto-Archiv

La poŝtservo „post MODERN“ eldonis en decembro 2014 la duan poŝtmarkon memore al la „Marie-Hankel-Kulturtagoj“ en Dresden kun 3 nominaloj: 40 cendoj sur viola, 50 cendoj kaj 55 cendoj sur oranĝa fono.

Kun sama bildo de tiu el 2009:

LA KVARO POR LA KVARA (UK 1908 en Dresden) sur verda fono.



Decembro 1934



Februaro 1934


El la historio de nia Esperanto-filatelio

Danke al la laboro de Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu disponigas rete kopiojn de multaj historiaj E-gazetoj, ni retrovas interesajn informojn pri nia E-filatelio.

La *BRAZILA ESPERANTISTO* en siaj numeroj de Februaro kaj Decembro 1934 plurpaĝe informas pri poŝtaj E-bildkartoj kaj poŝtaj E-stampoj.



Rio de Janeiro / Ĉambro de la Deputitoj



Rio de Janeiro / Groto de la gazetaro ...



Rio de Janeiro / Maïra Pavilono




Rio de Janeiro / Avenuo Rio


La poŝtkontoro en la Internacia Specimena Foiro en Rio de Janeiro, 1934, uzis tri stampilojn kun E-tekstoj.



Poŝtkontora stampo (BRA 2)



Reklamstampo kun "TURISMA URBO" (BRA 1) Uzita ankaŭ 1937



„Reklamstampo“ aŭ „afrankstampo“ (1934) kun E-lingva teksto (BRA? Ne katalogita)



BRA 8 verda)

Registrite sendita koverta kun E-lingva poŝtkontora stampo el la 12a Internacia Specimena Foiro, 1939, en Rio de Janeiro

La brazilaj bildpoŝtkartoj de 1933 kaj 1934

Notitaj en la Vana-katalogo (BRA 1933 01-20)

- | | |
|-----------------------------------|------------------------------|
| 01 Ĉambro de la Deputitoj | 02 Groto de Gazetaro |
| 03 Preĝejo de Nia Sinjorino | 04 Ĝardeno sur Placo Parizo |
| 05 Havena eniro | 06 Kanalo Mangue |
| 07 Montoj Korkovado-sukerpano | 08 Marbordo Botafago |
| 09 Maŭra Pavilono | 10 Palaco Guanabara |
| 11 Golfo de Botafago | 12 Parto de golfeto Botafago |
| 13 Placo Floriano | 14 Avenuo Rio Branco |
| 15 Placo Monroe | 16 Placo Parizo |
| 17 Preĝejo de Nia Sinjorino d. P. | 18 Specimena Foiro |
| 19 Urba Teatro | 20 Vidaĵo de la Havena kajo |

Notitaj en la Vana-katalogo (BRA 1934 21-59)

- | | |
|------------------------------------|----------------------------------|
| 21 Akvofalo P. Alonso | 22 Paraiba Joao Pessoa Placo |
| 23 Amazonas / Manaus | 24 Amazonas / Rio Negro |
| 25 Baia/Cachoeira + St. Felix | 26 Ceara baraĵo / Quixado |
| 27 Espirito Sankta / Haveno | 28 Estado de Rio / Monto Teresp. |
| 29 Goia akvofalo de Piloes | 30 Maranhao – S. Luis |
| 31 Mata Grosso / Corumba | 32 Mata Grosso / Cuiba |
| 33 Minas Gerais / Juiz de Fora | 34 Nordoriento / Palmoj |
| 35 Nordoriento / La flos | 36 Nordoriento / Bovkunigado |
| 37 Nordorientaj marbordoj | 38 Nordor. marb.: Cabo Branco |
| 39 Nordor. tipoj: Bovogardistoj | 40 Paraiba / Joao Pessoa |
| 41 Paraiba Joao Pessoa Placo | 42 Parana Iguasso - Diabla Gorĝo |
| 43 Parana Curitiba / Fervojo | 44 Parana Ponta Grossa Vila Vel. |
| 45 Parana Sete Quedas | 46 Para Belem ĉefurbo |
| 47 Para Belem Teatro de la Paco | 48 Pernambuco Insulo F Novonha |
| 49 Pernambuco Recife | 50 Piani Terezino |
| 51 Rio Grande d. N. Areia Preta | 52 Rio Granda d. N. Marbordo |
| 53 Rio Grande do Sul Porto Alegre | 54 Rio G. d. S. Porto Alegre PTT |
| 55 St. Caterino Akvofalo Rio Preto | 56 Santos Panoramo |
| 57 Sao Paulo Placo de Katedralo | 58 Sao Paulo Placo D. Pedro IIa |
| 59 S. Aracuja Katedralo | |



BRA 3 (verda)



BRA 10


Regiona filatela ekspozicio kun Esperanto salono 2014 en Svitavy

Planita „tutŝtata“, finfine ĝi okazis kiel „regiona“. La organizintoj povis realigi ĝin sukcese. Videblis en la ekspozicio eĉ filatela ekspozajaĵo pri „Historio de Esperanto“ de s-ano Alois Jakubec el Hranice. Li tiun donacis al la Esperanto-Muzeo de Ĉ E A en Svitavy. La estrino de la muzeo, s-anino Libuše Dvořáková, estis membro de la prepara ekspozicia komitato. Sub ŝia gvido okazis interesa E-salono „Esperanto kaj kolektado“ (la jam 8a ekspozicio de la E-Muzeo). Videblis ekspozajaĵoj pri i.a. glm, folkloro vestitaj pupetoj, bildkartoĵoj, filatelaĵoj, ktp.



Por la filatela ekspozicio aperis individuaj poŝtmarkoj kun talonoj. Inter ili troveblas 3 div. E-temaj talonoj kun la emblemo de la ekspozicio. Pri ili ne eblas trovi ion en la ret-informoj... tamen ili videblas lige kun la bildoj pri la aperintaj poŝtmarkoj.

Krome aperis poŝta karto kun E-surskribaĵo kaj eĉ bildo kun vorto ESPERANTO.



Alois Jakubec
antaŭ la ekspozajaĵo
donacita al la E-muzeo




Bildo sur la pk-tutaĵo



**Individua pm-folio kun 9 pm kaj E-talono Muzeum Esperanta
(Dekstre la meza talono)
por la filatela ekspozicio en Svitavy 2014**

**Desegnaĵo de s-ano Pavel RAK:
„Mi estas la blua maŭricio“
Informoj trovitaj en la reto**



Alia 9-folio kun du diversaj E-talonoj:

Dekstre meze: Muzeum Esperanta

Dekstre sube: Regiona filatela ekspozicio/Esperanto muzeo
(Bildoj senditaj de Libuše Dvořáková)



Poŝtkarto-tutaĵo por la Regiona Filatela Ekspozicio kun salono Esperanto en Svitavy 2014. Sube, maldekstre la subskribo de Miroslava Tomečková.

Jen la sciigo de Ĉeĥa Poŝto en la reto pri la eldono de E-pk-tutaĵo:

Eldonkvanto: 3300 ekz.

Aperdato: 3. 9. 2014

Kat. n-ro: P 203

Desegno de: Miroslava Tomečková

Prezo: 18 Kčs

Vendita ĉe: Giĉetoj de Ĉeĥa Poŝto (POSTFILA)

+++

Adresflanke kun la teksto en E:

Regiona filatela ekspozicio kun salono de Esperanto

kaj E-tema ilustraĵo


(E-istoj tenas la emblemon de la ekspozicio)

Miroslava Tomečková, (nomata ankaŭ Mirka) estas Esperantistino kaj edzino de la vicprezidanto de ĈEA.

Koran dankon al s-ino Libuše Dvorakova pro senditaj informoj kaj skanaĵoj de la pm-folioj kaj pk.



2014 Herzberg-DE „Bonvenon“





2014 Erfurt-DE „91a EK“




2014 66a IFEF-kongreso



2014 Erfurt-DE

Fai della Paganella –
2014 IT
81a Itala EK



SONG Shengtan
en filatela ĵurnalo

NANJING PHILATELIE

Pri ELF/AREK

kaj Esperanto-filatelo

Nia kluba amiko SONG Shengtan estas filatelisto kaj esperantisto ekde la fruaj 1950aj jaroj. Li estas membro de la Filatela Asocio de Provinco Jiangsu, aktiva en la filatela klubo de Nanjing. En nia ELF/AREK li membras jam 47 jarojn kaj havis/as amikajn kontaktojn al multaj de niaj membroj.

Lia E-filatela kolekto havis lokon en urbaj, provincaj kaj eĉ tutmonda pm-ekspozicioj. Li estas la aŭtoro de la E-pm katalogo, eldonita de Ĉ E L, kaj de Suplemento. Jam ofte aperis artikoloj de li pri Esperanto-filatelo en la filatela ĵurnalo *NANJING PHILATELIE*.

Jen nekompleta listigo de liaj artikoloj el lastaj jaroj:

Antaŭ 2009 aperis almenaŭ 4 artikoloj

2009-1	paĝoj 38-41	Pri Volapuk k Amoy	kun 15 bildoj
2009-2	paĝoj 37-39	Pri AF/AS –Zamenhof	kun 45 bildoj
2009-3	paĝoj 27-30	Pri div. E-filatelaĵoj	kun 30 bildoj
2009-4	paĝoj 32-36	Pri div. E-filatelaĵoj	kun 54 bildoj
2010-1	paĝoj 24-31	Pri UEA kaj SAT	kun 65 bildoj
2011-2	paĝoj 22-28	Pri div. Zamenhofaĵoj	kun 67 bildoj
2011-4	paĝoj 28-31	Pri E-literaturo	kun 35 bildoj
2012-1	paĝoj 25-31	Pri E-filatelaĵoj	kun 61 bildoj
2012-4	paĝoj 26-31	Pri pk-tut de SU	kun 30 bildoj
2013-1	paĝoj 17-24	Pri E-pm	kun 78 bildoj
2013-2	paĝoj 26-31	Pri ind. E-pm	kun 49 bildoj
2013-3	paĝoj 17-21	Pri E-filatela historio	kun 43 bildoj

邮票百科

人造国际辅助语的前世今生（续十一）

□ 宋绳坦

（2）世界语的应用（上）

世界语自 1887 年诞生以来，一直在接受着社会各方面的检验。由于它建立在现代民族语之上，具备了民族语中所有合理的、有用的因素，既



图 1

简易又有规则，因而，世界语不仅能够表达人们日常交往的思想，而且还能够表达人类复杂的感情。语言学界曾进行过很多次试验来检查世界语的表达能力，一般的结论至少可以承认世界语能够表达民族语所表达的东西。由民族语译成世界语的文件、资料和文学作品，其准确性和艺术表现力也是世所公认的。因为世界语的适应性很强（图 1：法国世界语学会印制的柴门霍夫像明信片；图 2：克罗地亚邮政为奥西克市世界语 110 周年纪念而发行的明信片；图 3：匈



图 2

牙利布达佩斯市邮政局为世界语 100 周年印制的纪念明信片）。



图 3

世界语在其存在的 124 年间，语言本身已经有了很大的发展和丰富。世界语的出版物日益增加，据英国伦敦不列颠世界语学会图书馆的材料显示，到 1956 年止有 3 万多种著作。它包括了大部分的文艺作品（翻译和原作），小部分的科学著作。各国的主要文学作品差不多都有世界语译本，其中不少是很精



图 4



图 5

湛的翻译。这个 1956 年的统计是 55 年前的数字，现在已是 2011 年，数量肯定大为增加，仅中国在 1978 年以后就出版了中国的四大名著《红楼梦》（图 4）、《三国演义》（图 5）、《水浒传》（图 6）和《西游记》（图 7）世界语译本。据国际世界语协会 2011 年年鉴统计，目前，奥地利、比利时、英国、捷克、法国、德国、西班牙、



图 11



图 12



图 18



图 13



图 14

色放大镜》(La Verda Lupeo)。

1968 年,在捷克斯洛伐克“布拉格世界邮票展览”期间,由瑞典、丹麦、奥地利、西班牙、波兰、联邦德国、民主德国、捷克斯洛伐克、葡萄牙、法国等 10 国世界语集邮爱好者共同发起成立以世界语集邮为主体的团体“世界语收藏者之友社”(Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj, 简称 AREK), 由瑞典人伊伐·鲍尔松(Ivar Paulson)任会长(图 9)。会刊为《火凤凰》



图 15

由瑞典人伊伐·鲍尔松(Ivar Paulson)任会长(图 9)。会刊为《火凤凰》



图 17



图 16

(FENIKSO) (图 10: “世界语收藏者之友社”会刊《火凤凰》1968 年 10 月创刊号封面)。

1974 年,为了团结一致,加强世界语集邮爱好者队伍力量,“集邮家世界语协会”和“世界语收藏者之友社”研究合并成一个团体组织,全称为“集邮家世界语协会/世界语收藏者之友社”(ELF/AREK)。由瑞典人伊伐·鲍尔松任会长。会刊合并后为《绿色放大镜/火凤凰》(La Verda Lupeo / Fenikso),



图 19



图 20


由民主德国人鲁道夫·布尔迈斯特(Rudolf Burmeister)主编(图 11: 合并后的会刊《绿色放大镜/火凤凰》;图 12: 会刊主编布尔迈斯特;图 13: 会员使用的封口纸;图 14: 会员卡)。目前,



图 21



Nia kluba amiko Roman Kubczyk en la pola urbo Czestochowa jam en 2009 aperigis okaze de 25jara geedziĝo individuan pm-talonon kun la E-a teksto NI PAROLAS ESPERANTE. Post kvinjara malapero de tiu ĉi letero ĝi nun revenis el sia kaŝloko... Mi kore esperas, ke vi intertempe jam festis la 30jaran kaj same simpatie ridetas unu al la alia. -rb-



Komputila strangaĵo malaperigis duonan LVL-paĝon de 15/167:

- 3) 1938 75 sk kun flago, 75 sk kun soldato, 75 sk kun templo
4) 1938 "Kvin" daloj (princino kaj princo de Atlantis)
 4 daloj kaj 5 daloj (Neptuno)
5) 1938 3 skaloj kun Atlantis-mapo
Bildojn por la pozicioj 3, 4 kaj 5 mi ne havas. Eble vi?



La arbara Kuznecov-monumentego videblas per Guglo maps:

<https://www.google.com.br/maps/@58.9102203,54.586884>

Dankon al nia Piton!





ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.



La ELF/AREK-poŝtmarkoj estas ankoraŭ haveblaj ĉe nia prezidantino.

La poŝta stampo de la itala EK 2014 en Fai della Paganella ankaŭ haveblas ĉe ŝi!

Stampita sur kongresa pk: 2.50 € plus elsendokostoj.

La mezuro de la stampo: ovala 38x32



Ekspozicio ESPERANTO KAJ FILATELO en Herzberg

La vigla „Esperanto-Centro“ en Herzberg/Harz/DE, sub la gvido de nia kluba amiko Peter ZILVAR, prezentas ekde okt. 2014 en la E-salono de la urba kastelo la jam dekan fakan plurmonatan ekspozicion sub la temo ESPERANTO KAJ FILATELO.

Malfermis ĝin la urbestro Gerhard WALTER.

